# La Riverego

Januaro 2003 | Esperanto-Societo Kebekia | Nro 71, Jaro 18a

## Iom pli da Esperantio mi petas!

Farbante matene ĉe mi, mi umis pri la Esperanto-movado. Nun mi aktivas de 20 jaroj ene de la E-movado en Kebekio kaj mi povas diri ke ni multon faris por disvastigi la movadon dum tiu duobla jardeko. Rezulte, ĉu vere la movado kreskis?

Mi ne povus kontentige jesi al la demando. Sed mi tamen ne bedauras ĉar kiam ni alvenis (mia edzino Zdravka kaj mi) al Montrealo en 1982, la E-movado estis sufiĉe aĝa. Nun fine, mi vidas ke ĝi junas, mezjunas kaj pliaĝas. Do ni atingis ekvilibron.kvankam ni diru ke daure ĝi estas multe pli vira movado ol virina.

Nu, umante mi pripensis kial la Montreala Klubo malviglas kvankam sufiĉe da homoj membras? Mi komprenas ke klubaj kunsidoj ne povas allogi ĉiujn; junuloj havas multajn studojn, mezaĝuloj familion kaj pliaĝuloj fojfoje ne volas eliri vespere. Sed mi pensas ke preter ĉio tio, la reto (kaj moderna vivo) iel malhelpas ĉar eblas facile Esperantumi sen eliri sian domon. Jes, ĉe la reto estas tiom da legaĵoj, radio-elsendoj kaj eĉ la ebleco babili aŭ korespondi tutmonde. Nu, ĉu mi simple bedaŭru kaj ankaŭ same faru? Mi tamen pensas, ke Esperantio estas io pli agrabla ol nur sidi antaŭ komputilo! Pruvo estas, ke la 9-a Internacia Semajnfino Esperantista en Okemo, Vermonto, altiras 60 Esperantistojn ĉiujare. Mi estas la ĉefa organizanto kaj ricevas plurajn belajn dankmesaĝojn post ĝi. De komencanto kiu unuafoje spertis "vivantan" Esperanton ĝis pli sperta Esperantisto kiu ĝuis la etoson kaj la programon.

Certe iri al Esperantio estas bela sperto sed multe kostas iri al la UK aŭ al Eŭropo por esperantumi. Tiam, ni kreu pli da Esperantio en Ameriko. Mi proponas ke ekde 2003 ni ĝemeligu la klubojn en Toronto, Otavo, Montrealo kaj Kebeko. Vi eble diros: tre bone sed kio poste? Daŭre restos la grandaj distancoj inter tiuj urboj!

Fine de mia umado mi pensis pri nova renkontiĝo printempa. En Kanado, ni havas ferian tagon la trian lundon en majo. Tiam ne plu estas neĝaj ŝtormoj, ne estas familia aŭ religia festo (kiel Pasko kaj Kristnasko) ni do povus renkontiĝi kvarurbe. Se ni alternative organizas ĝin ekzemple en 2003 en Otavo, en 2004 en Kebeko, en 2005 en Toronto en 2006 en Montrealo kaj reen al Otavo en 2007, neniu multe laborus. Mi lanĉas la ideon, pripensu, umu kaj poste rapide reagu al mi. Mi pensas pri turisma semajnfino kun vizito al muzeoj, urba gvidado en Esperanto, restoraciaj manĝoj kaj tranoktado ĉe Esperantistoj kaj en hotele laŭvole. Ne necesus lui kunvenejon, pretigi kursojn kaj prelegojn. Temus pri semajnfino da simpla Esperantumado en amika etoso. Tio ja laŭ mi mankas en Ameriko kaj nepre komencantoj kaj novuloj devas sperti tion. Sperti Esperantion.

***Normand Fleury***

## Tria SEBO

La dua Semajnfino Esperanto & Biciklado (SEBO) estis tre sukcesa kun dudeko da partoprenantoj el Usono, Ontario kaj Kebekio. En 2003, ni denove organizas ĝin kaj invitas vin partopreni eĉ se vi ne estas biciklema!

SEBO okazos de la 6-a ĝis la 8-a de junio en Montrealo, kadre de la bicikla festivalo. Se vi alvenos frue vendrede, vi povos partopreni la noktan bicikladon tra la urbo kaj se vi ne foriros tro frue dimanĉe vi povos partopreni Le Tour de l'île, la 70-km-an bicikladon tra Montrealo sen aŭtomobila ĝeno.

Tiuj kiuj partoprenis antaŭe multege ĝuis la amikecan etoson de la biciklado. Kiel mi diris, por la ne-biciklemuloj, okazos alternativaj vizitoj al diversaj turistaj lokoj kaj muzeoj. Aliĝu frue, tio helpos nin pli bone organizi la semajnfinon.

esperanto@sympatico.ca

## Bedaŭrinde...

Kasisto malofte anoncas bonajn novaĵojn al la membroj.

Antaŭ unu jaro, la estraro kalkulis la kotizon kun abono al "Le Monde de l'Espéranto" surbaze de diversaj faktoroj, inkl. tion ke eŭro valoris ĉ. 1,35 kanadan dolaron. Hodiaŭ, ĝi valoras ĉ. 1,60 $...

Sekve, la estaro nun devas tuj altigi tiun kotizon kun abono de 30 $ al 40 $.

Kvankam ESK estas senprofitcela organizo, ĝi tamen ne estas malprofitcela organizo...

## Malheureusement...

Il y a un an, nous avions fixé la cotisation incluant l'abonnement à "Le Monde de l'Espéranto" sur la base de projections tenant compte d'un euro à 1,35 $. Actuellement, sa valeur est plutôt 1,60 $. Donc...

Le C.A se voit obligé de hausser immédiatement cette cotisation avec abonnement de 30$ à 40$. Même si la SQE est une organisation à but non lucratif, elle n'est quand même pas à but déficitaire.

Alors... ***Sylvain Auclair***

# Unua esperanta sperto

Ĉijara Zamenofa festado estis okazo por substreki du gravajn datrevenojn: tiun de la dudekjariĝo de la ESK, kaj tiun de la alveno de la internacia lingvo en Montrealo de antaŭ cent jaroj. Okaze de tio, interesa finsemajno estis planita. Por mi, estis unua sperto de esperanta "enakviĝo". Antaŭ pli malpli du jaroj mi lernis Esperanton, sed antaŭ tiam mi nur havis okazon uzi ĝin pere de la Reto. Nu, tiumaniere mi estis invitata ĉe la familio Fleury, kie mi estis gastigata kaj ekspertis voĉan esperanton de antaŭ ĵaŭde verpere. Tio ja agrable fremdigis min, mi kutimiĝis kaj ekspertis memorindajn babiladojn. Mi ja ĉiam memoros mian kuiradon kroateskan kun Zdravka! Unua rendevuo kun aliaj esperantoparolantoj okazis vendredon vespere, ĉe la MED-o, por ĉeestantoj estis okazo eknaskigi tiun faman etoson Esperantan, babilante kaj partoprenante diversajn ludojn. Sabate antaŭtagmeze, ĉiuj povis akiri librojn el la troaĵoj de la kanada libro-servo ĉe MED-o. Tiuj kiuj priinteresis poste iris vizitadi Montrealon en grupeto. Estis spertindaĵo, laŭ mi, uzi Esperanton inter ni estante ĉirkaŭitaj de nacilingvparolantoj, ni kvazaŭ impresis fremdiĝon en nia propra lando... Mirigegis min kiom facile ĉiuj interkompreniĝis kaj precipe kiel facile, mi mem povis interŝanĝi kun la aliaj, malgraŭ mia malsperteco! Vespere, ĉiuj kuniĝis ĉe la Botanika Ĝardeno por la pli "oficiala" kunveno. Disvolviĝis unue vespermanĝo komuna ornamita de ĉies kulturoj kaj gustoj. Estis mirinde renkonti tiom da samideanoj el Kebekio, sed ja ankaŭ bedaŭrinda, ke ni ne havis pli da tempo por ĉiuj konatiĝi! Antaŭ la deserto, pligrandigante la amikeman etoson, profesia dirigento amuze ĉiujn kantigis kristnaskeske. Postmanĝade, ni eniris prelegejon kie Jean Sorel legis verkon lian ĵus antaŭ, kiam Normando kaj Zdravka fine fotakompanitaj revivigis la historion de la ESK de la komenco ĝis la nuneco. Dum la semajnfino, vera etoso amikema kaj paca naskis, ligante nin ĉiujn per tiu komuna idealo. Estis ja por mi komenco de longa sinsekvo de Esperantaj renkontiĝoj!

*Emanuelo Gamache*

# Dudekjariĝo de ESK: bonega semajnfino en tute esperanta etoso!

Kiel kutime, mi alvenis ĉe la Montreala Esperanto-Domo je la deknaŭa kaj duono. Ĝi jam pretis akcepti la sabatajn libroŝatantojn. Ne estis pli da homoj ol kutime en monataj kunvenoj, sed la libroj ja pretis; tio estis la ĉefa afero ! Post ludoj kaj babilado, mi revenis hejmen por dormi, eksentante iom da senpacienco pri la morgaŭo. Sabate matene, la librobazaro bone pasiĝis, kaj preskaŭ ĉiuj forlasis la salonon kun granda sako plena je Esperantaj libroj ! Poste, pluraj el ni iris en la urbocentron, por viziti la urbon kaj ĉefe muzeon. Post tre agrabla tagmezmango en ĉina restoracio, en la ĉina kvartalo, ni iris al la historia kaj arkeologia muzeo "Pointe-à-Callière", kiu troviĝas en la malnova urbo. Tio estis interesa vizito kaj bona okazo pli bone koni la aliajn samideanojn.
Post tiu vizito, ni iris al la Botanika Gardeno, kie estis planita la vespero, kiu devis esti granda momento en la montreala kaj kebekia Esperantismo, estante Zamenhofa festo, sed ĉefe la dudeka datreveno de la ESK... Kaj ĝi ja estis! Post bonetosa manĝo vivigata de laŭdaj esperantaj babiladoj, ni iris en pli grandan salonon, kie Esperantista kantisto kantigis nin, en granda kantgrupo, kiu tre rapide fariĝis bela horo! Tio finata, ni iris al tria salono (jes, ni ja havis multe da loko!), kie Normando kaj Zdravka, fundintoj de la ESK, rakontis la historion de la asocio, per multaj bildoj, de la komenco ĝis nun. Dudek jaroj da laboro, renkontoj, amikecoj, estis priskribataj, feliĉigante ĉiujn ĉeestantojn, el kiuj multaj repensis pri bonaj memoraĵoj, vidante la bildojn! Post tio, ni aranĝis la lokojn kaj foriris ĉirkaŭ la 22-a kaj duono. Estis vere agrable vidi ĉiujn tiujn Esperantistojn, de la plej junaj ĝis la plej maljunaj, ĉefe el Kebekio sed ankaŭ el aliaj lokoj, babiladi kune! Kompreneble, la vespero sajnis mallonga, sed la daŭro estis bona, car ni jam iom lacis, post tiom da agadoj! Nun mi esperas, ke mi denove povos vivi tian spertaĵon !

Tristan Denéchaud

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto six fois par année. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Autrement, l'abonnement annuel est de 10$.
La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia sesfoje dum la jaro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indoko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-doko de la Societo: kebk-d.

**Échéance pour le prochain numéro/Limdato por la venonta eldono: 2003.02.15**

jessylapointe@hotmail.com

Rédacteur en chef/Ĉefredaktoris Jessy LaPointe. Ont collaboré à ce numéro/Kunlaboris al tiu ĉi numero Normand Fleury kaj François Bay. Administrateurs de la SQE/Estraranoj de ESK: Normand Fleury (président/prezidanto), Jérôme-Frédéric Bouchard (vice-président/vicprezidanto), Sylvain Auclair (trésorier), Jessy LaPointe (secrétaire/sekretario) kaj François Bay.

**Esperanto-Societo Kebekia/Société québécoise d'espéranto**
6358-A, rue de Bordeaux
Montréal (Québec)
H2G 2R8
Telefonrespondilo kaj telekopiilo/Répondeur et télécopieur: (514) 272-0151
esperanto@sympatico.ca
http://www3.sympatico.ca/esperanto